# BEKKURSO 1994

# BEKKVAR (2.4)

VERKITA DE

**DEK**

# *BEKKVAR enhavo*


| paĝo | enhavo | metodo de praktikado |
|---|---|---|
| 1 | la participa sistemo | |
| 2 | participoj adverbaj | klarigado |
| 3,4 | participoj adverbaj | skribekzerco |
| 5 | repaso | valencia metodo + |
| 6 | ĉar, do, sed, tamen, kvankam | skribekzerco |
| 7 | participoj adverbaj | skribekzerco |
| 8 | estis, estas, estos + ita | klarigado |
| 9 | estis, estas, estos + ita | valencia metodo + |
| 10 | subjunktivo | klarigado |
| 11 | repaso | valencia metodo + |
| 12 | ita, igita | valencia metodo + |
| 13 | participoj substantivaj | speciala ekzerco |
| 14 | participoj substantivaj | skribekzerco |
| 15 | participoj -- repaso | valencia metodo + |
| 16 | repaso | valencia metodo + |
| 17 | participoj -- repaso | skribekzerco + val. metodo + |
| 18 | repaso | speciala ekzerco |
| 19 | repaso | speciala ekzerco |
| 20 | ata | klarigado |
| 21 | ita, ata | valencia metodo + |
| 22 | repaso | valencia metodo + |
| 23 | participoj adjektivaj | skribekzerco |
| 24 | participoj adjektivaj | speciala ekzerco |
| 25 | bildo | |
| 26, 27 | demandaro pri bildo | valencia metodo + |
| 28 | participoj adjektivaj | speciala ekzerco |
| 29 | -ig, -iĝ, -igita, -iĝinte | skribekzerco |
| 30 | eligado de eraroj | skribekzerco |

# La Participa Sistemo

| | | | |
|---|---|---|---|
| AKTIVAJ | adjektivaj | is | venkinta |
| | | as | staranta |
| | | os | ironta |
| | adverbaj | is | vekiĝinte |
| | | as | dormante |
| | | os | manĝonte |
| | substantivaj | is | venkinto |
| | | as | lernanto |
| | | os | gajnonto |

| | | | |
|---|---|---|---|
| PASIVAJ | adjektivaj | is | venkita |
| | | as | parolata |
| | | os | forĵetota |
| | adverbaj | is | ekscitite |
| | | as | nekonate |
| | | os | frapote |
| | substantivaj | is | venkito |
| | | as | konato |
| | | os | arestoto |

Vi lernos:

-onte, -ante, -inte

## Ekzemploj I:

1 Manĝonte, li sidiĝis ĉe la manĝotablo.

2 = Antaŭ ol li manĝis, li sidiĝis ĉe la manĝotablo.

3 Manĝante, li parolis kun la aliaj kunmanĝantoj.

4 = Dum li manĝis, li parolis kun la aliaj kunmanĝantoj.

5 Manĝinte, li stariĝis kaj eliris el la restoracio.

6 = Post kiam li manĝis, li stariĝis kaj eliris el la restoracio.

## Ekzemploj II:

1 Dormonte, li malvestis sin.
li pretigis sian liton.
li malŝaltis la lumon.
li kuŝiĝis.
li oscedis.

2 Dormante, li aŭdis nenion.
li turnis sin en la lito.
li sonĝis, ke li povas flugi.
li sonĝis pri strangaj estaĵoj kaj uloj.

3 Dorminte, li sentis sin pli bone.
li ellitiĝis
li vestis sin
li matenmanĝis

## Vi praktikos skribe:

**-onte, -ante, -inte**

Uzante participojn, anstataŭigi la sekvajn substrekitajn frazojn:

1 Antaŭ ol vojaĝi en fremdajn landojn, mi havigis al mi pasporton.

⇒

2 Dum mi vojaĝis en suda Hispanio, mi perdis mian pasporton ie proksime de Valencio.

⇒

3 Post kiam mi revenis hejmen, mi ricevis aerpoŝte la perditan pasporton kiun la ambasadorejo sendis al mi.

⇒

4 Antaŭ ol ludi, la muzikistoj agordis siajn instrumentojn.

⇒

5 Dum ili ludis la kvinan simfonion de Betoveno, la muzikistoj muzike plezurigis la aŭskultantaron.

⇒

6 Post kiam la orkestranoj ludis la muzikaĵon, ili metis siajn instrumentojn en la ujojn.

⇒

7 Morgaŭ, antaŭ ol iri al la supermerkato, mi iros al la banko.

⇒

8 Ne forgesu hejti la fornon, antaŭ ol meti la kokinon enen.

⇒

9 Post kiam ili finas la operacion, kutime la kuracistoj kaj kirurgoj lasas la operaciejon kaj la malsanulejon kaj iras hejmen.

⇒

10 La kirurgoj rigardas tre atente la pacienton kaj la mezurilojn dum ili operacias.

⇒

11 La kirurgoj ĉiam lavas siajn manojn ĝisfunde antaŭ ol operacii.

⇒

12 Ni flugos al Novjorko antaŭ ol iri al Ĉikago.

⇒

13 Dum mi naĝis en la maro mi vidis du danĝerajn ŝarkojn kun akregaj dentoj!

⇒

14 Vi vidos malnovajn kastelojn dum vi vojaĝos inter Parizo kaj Madrido.

⇒

15 Tuj post kiam ili aŭdis la laŭtegan eksplodon, la vilaĝanoj kuris ĉien.

⇒

16 Dum Petro kuŝis en la lito de la hospitalo post sia akcidento, li pensadis pri ĉio kaj nenio, pri ĉiu kaj neniu.

⇒

17 Ne forgesu tuj reveni post kiam vi poŝtos la leterojn kaj poŝtkartojn.

⇒

Vi repasos:

Repaso

1 Ĉu al vi plaĉus vojaĝi ĉirkaŭ la mondo se vi gajnus la loterion?
2 Ĉu vi loterias de tempo al tempo?
3 Se mi donus al vi cent dolarojn, ĉu vi elspezus ilin aŭ ŝparus ilin?
4 Kion vi dirus pri vi: ĉu vi estas pli laborema aŭ pli mallaborema?

5 Kion vi faris unue kiam vi vekiĝis ĉi matene?
6 Pri kio vi sonĝis ĉi nokte? Ĉu vi rememoras aŭ ĉu vi forgesis?
7 Kiom da horoj vi dormis ĉi nokte? Kaj kutime?
8 Kion vi faras kiam estas malfacile al vi dormiĝi aŭ redormiĝi?

9 Kiajn librojn vi preferas? Fikciajn aŭ nefikciajn?
10 Kio estas via plej ŝatata libro?
11 Kiam vi legas, ĉu estas por plezuro aŭ por laboro aŭ por studo?
12 Ĉu vi ofte prunteprenas librojn de la biblioteko?

13 Ĉu la riveroj en via regiono estas poluciitaj aŭ puraj.
14 Se ili estas poluciitaj, laŭ vi kiu devas purigi ilin?
15 Kaj la aero? Ĉu ĝi estas perfekte spirebla kie vi loĝas?
16 Kiu aŭ kiuj respondecas pri la pureco aŭ malpureco de nia aero? La registaro, la firmaoj, la publiko, la aŭtistoj?

17 Ĉu estas multe da senlaboreco en via lando?
18 Ĉu la ekonomio pliboniĝas aŭ, male, malpliboniĝas?
19 Kion antaŭdiras la ekonomistoj?
20 Ĉu vi estas pesimista aŭ optimista pri la ekonomio?

21 Se vi laboras, ĉu via salajro estas sufiĉe alta? Aŭ ĉu vi kredas, ke via organizo devas plialtigi vian salajron?
22 Viaopinie, ĉu estas bone, ke certaj firmaoj maldungas siajn laboristojn ĉi tie, kaj samtempe dungas aliajn eksterlande?
23 Se vi laboras, ĉu via estro traktas vin bone?
24 Ĉu via laboro kontentigas vin, aŭ ĉu vi preferus labori aliloke?

Vi lernos, kaj praktikos

**ĉar, do, sed, tamen, kvankam**

Johano praktikas Esperanton multe. Li parolas ĝin preskaŭ perfekte.

⇒ Johano praktikas Esperanton multe, do li parolas ĝin preskaŭ perfekte.
⇒ Johano parolas Esperanton preskaŭ perfekte, ĉar li praktikas ĝin multe.
⇒ (Kvankam) Johano parolas Esperanton preskaŭ perfekte, (tamen) sed li ne skribas tiel bone, ĉar li neniam faris BEKKVAR de la BEKkurso.

1 Paŭlo gajnis la loterion. Li ne plu havas monan problemon.

2 Hodiaŭ li ne tagmanĝis. Li estas malsata.

3 Li ne laboris. Li estis malsana.

4 Lia dento ege doloris. Li iris al dentisto.

5 Maria pruntedonis al mi globkrajonon. La mia rompiĝis.

6 La borso kaj liaj akcioj falis. Li perdis multe da mono.

7 Pako soifegas. Li ŝvitis multe dum la laboro.

8 Mi venos morgaŭ alifoje. Mi ankoraŭ ne finis la taskon.

## Vi lernos, kaj praktikos: -onte, -ante, -inte

a) ŝalti la televidilon, b) trinki kafon kun lakto kaj kukon por la deserto,
c) elbanujiĝi ĉ) purigi la lipojn per buŝtuko de tempo al tempo,
d) malfermi la varmakvan kranon, e) sidiĝi ĉe la manĝotablo
f) ridi pro la amuza filmo g) stariĝi kaj iri al la necesejo
ĝ) babili kun la kunmanĝantoj h) ekpreni la sapon ĥ) vesti sin
i) formeti la manĝilaron j) sidiĝi en brakseĝon antaŭ la televidilo
ĵ) malvesti sin k) surmeti la manĝilaron
l) stariĝi kaj fermi la televidilŝrankon m) malŝalti la televidilon
n) eliri el la ĉambro kie troviĝis la televidilo
o) malplilaŭtigi la laŭtecon, ĉar lia edzino diris, ke estas tro da bruo
p) sapumi sin r) ĝui la varman akvon s) ŝanĝi la kanalon foje
ŝ) kuiri la kokidaĵon kaj terpomojn t) turni la antenon por trovi la kanalon
u) sekigi sin per bantuko ŭ) ŝampui la hararon v) eliri el la manĝoĉambro.

1 Sin banonte, li . . .

2 Sin banante, li . . .

3 Sin baninte, li . . .

4 Manĝonte, li . . .

5 Manĝante,

6 Manĝinte,

7 Rigardonte la televidilon,

8 Rigardante la televidilon,

9 Rigardinte la televidilon,

Vi lernos:

| | | |
|---|---|---|
| estis<br>estas<br>estos | + | ita(j) |

## Ekzemploj:

⇛ La banko estas fermita nun. (ĉar estas la 11a nokte)

⇛ La banko estis malfermita antaŭ 12 horoj. (ĉar estis la 11a matene)

⇛ Morgaŭ matene la banko, kiel kutime estos malfermita.

## Aliaj ekzemploj:

1 La fama libro Don Kiĥoto estis verkita de Cervantes, hispana verkisto.
2 Morgaŭ nia televidilo kiu paneis antaŭ tri tagoj estos riparita.
3 La ĉambro estas hela nun ĉar la lampoj estas ŝaltitaj.
4 La forflutruo de la lavkuvo estas ŝtopita, do ni devas malŝtopi ĝin.
5 Ties domo estas tre nova. Ĝi estis konstruita nur lastjare.
6 Estos instalita venontsemajne la nova komputilo kiun la firmao aĉetis.
7 Ĉu la kranoj de la banujo estas fermitaj aŭ malfermitaj?
8 Alveninte hejmen, li kroĉis sian jakon sur la hokon. Nun lia jako estas kroĉita sur la hoko

## Prinotu:

1 Hieraŭ mi vendis mian malnovan aŭton.
⇛ Mia malnova aŭto estis vendita hieraŭ (de mi).

2 Pablo mendos la lernolibrojn de la libroservo de Esperanto.
⇛ La lernolibroj de la libroservo estos menditaj de Pablo.

3 La muzikvendejo liveris mian pianon antaŭhieraŭ posttagmeze.
⇛ Mia piano estis liverita antaŭhieraŭ de la muzikvendejo.

## Vi praktikos

| | | |
|---|---|---|
| estis | | |
| estas | + | ita(j) |
| estos | | |

1 Ĉu Pikaso pentris la novan pentraĵon kiun oni metis en la artmuzeon?
2 Ĉu Aŭstria komponisto Mozarto komponis pli ol 40 simfoniojn?
3 Ĉu vi pakos viajn valizojn por la vojaĝo al Tahitio morgaŭ?
4 Ĉu ili konstruos la novan konstruaĵon en la venonta jaro?

5 Kiam ili finos tiun taskon kiun Maria donis al ili?
6 Kiam la farbistoj farbis la murojn de la unua ĉambro, kaj kiam ili farbos tiujn de la dua ĉambro?
7 Ĉu ili la radion kaj televidilon jam riparis ? (Jes-jam, Ne-ankoraŭ ne)
8 Kiam la servistino viŝis la meblojn en la salono?

9 Kiel nomiĝas tiu kiu verkis la faman hispanan libron Don Kiĥoton?
10 Antaŭ kiom da jaroj Dennis Keefe faris la unuajn provaĵojn de BEK?
11 Ĉu la aŭtoro de la BEKkurso ilustris la unuajn du librojn? BEKUNU kaj BEKDU?
12 Ĉu vi tranĉis la tomatojn kaj cepojn por la salato?

13 Ĉu vi jam kuiris la kokidaĵon kaj terpomojn por la vespermanĝo?
14 Ĉu la glasojn, tasojn, kaj aliajn ujojn vi lavis?
15 Ĉu la botelon da vino vi jam malkorkis?
16 Ĉu vi jam bakis la kukon por la deserto?

17 Kiu lavos la manĝilaron post la tagmanĝo hodiaŭ?
18 Diru al mi, ĉu la tajpistino tajpis la leterojn kiujn mi donis al ŝi.
19 Kiom el la 25 leteroj ŝi afrankis? Ĉiujn el ili? La duonon el ili?
20 Ĉu la komercistoj diris, ke ilia vendejo liveros la varojn baldaŭ?

21 Ĉu vi povus tuj poŝti tiun pakaĵon por mi?
22 Post kiom da minutoj vi faksos tion al nia banko en Tokio?
23 Ĉu la firmao telegrafos al ni morgaŭ, ĉu ili akceptos la novajn kondiĉojn en la kontrakto?
24 Ĉu ili kutime sendas la varojn per trajno, aŭ per kamiono?

Vi lernos:

subjunktivo => u

1 Mi petas, ke vi finu tiun taskon kiel eble plej baldaŭ.
2 Miaj geamikoj petis, ke mi kunportu la trinkaĵojn por la pikniko.
3 La generalo ordonis, ke la soldatoj marŝu antaŭen.
4 Mi ne volas, ke vi foriru morgaŭ. Atendu du tri tagojn almenaŭ.

5 La bankisto konsilis al ni, ke ni aĉetu akciojn de komputila firmao.
6 Ĉu vi deziras, ke mi fermu ĉiujn fenestrojn?
7 Nia instruisto postulas, ke ni ĉiam uzu bone la akuzativon.
8 Estas nepre, ke la gelernantoj de Esperanto parolu uzante la akuzativon.

9 Estas necese, ke pluvu en la venontaj tagoj. Se ne, ni perdos la duonon de la rikolto.
10 Liaj gepatroj malpermesis al li, ke li restu eksterhejme tro malfrue.
11 La bonaj instruistoj deziras, ke ĉiu kursano sukcesu pri Esperanto.
12 Estas malpermesate, ke oni veturu je pli ol rapideco de 50 kilometroj.

13 La rabisto devigis al la viro, ke li donu sian biletujon.
14 La kursgvidanto permesis al la kursanoj, ke ili havu paŭzon.
15 La verkisto de BEK proponis, ke ĉiuj kursoj de E-o estu plibonigataj.
16 Kio vin instigis, ke vi faru ĉi tion? (PAG)

17 Li trudis al mi, ke mi faru tion. (PAG)
18 La neĝa vetero malhelpis, ke ni veturu aŭte tiun vintran tagon.
19 Multe li klopodis, ke ili interpaciĝu. (PAG)
20 Ĉu vi deziras, ke mi malfermu la fenestron por aerumi la ĉambron?

21 La kuracisto ordonis al mi, ke mi multe ripozu kaj restu hejme.
22 Estas ordonite, ke mi ripozu kaj restu hejme.
23 Estas grave, ke ni legu E-on multe por lerni novajn vortojn.
24 Mia tutkora deziro estas, ke vi ĉiuj fartu bone, kaj ke vi sukcesu!

Vi lernos:

Repaso

1 Ĉu vi nun loĝas en urbo aŭ en la kamparo?
2 Kiaj estas la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de loĝado en la kamparo?
3 Laŭ via opinio, pro kio multaj personoj translokiĝas en la urbegojn?
4 Se vi povus loĝi en iu ajn urbego, kiun urbon vi elektus?

5 Ĉu vi sportas aŭ gimnastikas?
6 Se vi sportas, kiujn sportojn vi praktikas?
7 Kiujn avantaĝojn havas sportoj?
8 Kial la maljunuloj praktikas malpli da sportoj ol la junuloj?

9 En via lando, kiam ferias la plejparto de la loĝantaro?
10 Ĉu estas same en la tuta mondo? Aŭ ĉu la ferioj dependas de la lando?
11 Kiuj estas la plej vizitataj ferilokoj en via lando? Kaj en la najbaraj landoj?
12 Kien vi iris por via lasta ferio? Kial?

13 Ĉu estas multe da personoj kiuj informiĝas pri Esperanto?
14 Kial la plejparto de la publiko ne interesiĝas pri Esperanto?
15 Se vi estus la estro de la Esperanto-movado, kion vi farus por antaŭenigi Esperanton?
16 Ĉu publikaj rilatoj kaj reklamado povas esti utilaj al Esperanto?

17 Kiam estas la venonta voĉdonado pri la prezidenteco en via lando?
18 Ĉu vi pensas, ke la nuntempa prezidento aŭ estro reelektiĝos?
19 Se vi balotos (voĉdonos), ĉu vi atente aŭskultos ĉiujn kandidatojn antaŭ ol voĉdoni?
20 Ĉu vi opinias, ke viaj samnacianoj elektos la plej bonan kandidaton kiel prezidenton (aŭ estron)?

21 Kiom da fojoj vi vidis teatraĵon en la lasta jaro?
22 Kiel ofte vi vizitas muzeon de moderna arto?
23 Kiomofte vi aŭskultis operon?
24 Kiomfoje vi legis poezion en la lastaj du monatoj pli malpli?

## Vi lernos, kaj praktikos

fermi ⇒ fermita(j)
klarigi ⇒ klarigita(j)

1 Ĉu estis Pikaso kiu pentris tiun strangan bildon tie sur la muro?
2 Ĉu tiu hejtilo sufiĉe bone varmigas la banĉambron?
3 Ĉu oni malfermis la pordon kaj la fenestrojn ĉi matene por aerumi la ĉambron?
4 Ĉu la urbestrino diris, ke la urbo pligrandigos la novan parkon?

5 Ĉu la kelnero malkorkis la botelon da ĉampano, por ke la gastoj de la hotelo festu Novjaron?
6 Ĉu la ĵurnalisto publikigis tiun novaĵon en la ĵurnalo antaŭ tri tagoj?
7 Ĉu vi scias, kiam Doktoro Zamenhof eldonis la *Fundamenton*?
8 Ĉu la straton ĉe kiu vi loĝas la urbo plilarĝigos?

9 Ĉu vi rememoras la bildon kun la kvar katoj? Kiù kolorigis ĝin?
10 Ĉu la gazeto menciis la fakton, ke E-o estas multe pli facila ol la angla?
11 Vi ne forgesis la ebriulon, ĉu? Kio ebriigis lin? Vino aŭ viskio?
12 Kiam estis la lasta fojo kiam oni purigis la plankon de nia klasejo?

13 Ĉu la kasisto de la firmao diris, ke ili pagos la fakturon postmorgaŭ?
14 Bonvolu diri al mi, per kiu ilo Sinjoro Nopo mortigis la muŝojn?
15 Ĉu ili parkis sian veturilon sur la placo aŭ sur la centra parkejo?
16 Ĉu post la prelego, la ĉeestantaro starigis demandojn al la preleganto?

17 Ĉu post la laboro la lignaĵisto arigis ĉiujn siajn ilojn?
18 Kiam la patrino enlitigos siajn filon kaj filinon?
19 Kiom da birdoj trafis la ĉasistoj dum la granda ĉasado hieraŭ?
20 Kiujn molarojn eligis la dentisto? La suprajn aŭ la malsuprajn?

21 Kiu el la gepatroj eksterigis la katon ĉi foje? La patro aŭ la patrino?
22 Ĉu vi jam pagis la ĉi monatan fakturon por la telefono?
23 Dum nia vojaĝo en Ateno, ĉu la ĉiĉerono vidigos la Partenonon?
24 Ĉu la lingvoinstruisto aŭskultigis du kasedojn en la lasta leciono?

## Vi lernos, kaj praktikos

| | |
|---|---|
| -into | -ito |
| -anto | -ato |
| -onto | -oto |

| | | |
|---|---|---|
| venk<u>i</u>nto | = | persono kiu venk<u>i</u>s |
| venk<u>a</u>nto | = | persono kiu venk<u>a</u>s |
| venk<u>o</u>nto | = | persono kiu venk<u>o</u>s |
| venk<u>i</u>to | = | persono kiun oni venk<u>i</u>s |
| venk<u>a</u>to | = | persono kiun oni venk<u>a</u>s |
| venk<u>o</u>to | = | persono kiun oni venk<u>o</u>s |

1 mortinto
2 mortanto
3 mortonto
4 spektanto

5 ĉeestanto
6 naskito
7 naskoto
8 dunganto

9 dungitoj
10 lernantoj
11 kondamnito
12 arestito

13 arestanto
14 malliberigito
15 parolanto
16 aŭskultantoj

17 mortiginto
18 mortigito
19 paganto
20 pagato

21 kaptinto
22 kaptoto
23 kaptitoj
24 dormanto

25 nekonato
26 konatoj
27 sendinto
28 sidantoj

29 staranto
30 atendantoj
31 laboranto
32 kunlaboranto

33 malsana mortanto
34 novaj dungitoj
35 lernantoj atentaj
36 malfeliĉa arestito

37 parolema parolanto
38 freneza mortiginto
39 paganto sufiĉe riĉa
40 afablaj konatoj

41 laboremaj laborantoj
42 ludantoj petolemaj
43 furiozaj kaptitoj
44 lacegaj laborantoj

Prinotu: <u>iu kiu</u> tajpas estas tajpanto. <u>Tiuj kiuj</u> ĉeestas estas ĉeestantoj. KTP

## Vi praktikos skribe

-into -anto -onto

a) fumanto b) nefumanto c) drinkanto ĉ) legonto d) manĝanto
e) aŭskultantino f) naĝantino g) lernanto ĝ) piediranto h) grimpanto
ĥ) vojaĝanto i) mortinto j) pilgrimanto k) tradukinto l) spektanto
m) loĝanto n) biciklanto o) kantanto p) trinkanto r) venkinto

1 en la klasĉambro
2 ĉe matĉo de futbalo
3 kun cigaredo aŭ cigaro en la mano
4 sur la plaĝo sunumante sin

5 apud la radio aŭskultante muzikon
6 sur la trotuaro
7 en veturiloj kiel busoj, trajnoj, aŭtomobiloj ktp
8 en restoracio luksa sed ne multekosta

9 en taverno kun kolegoj kaj amikoj
10 en la sama taverno post kvar horoj!
11 sur la vojo al la granda preĝejo de Santiago de Kompostela en Hispanio
12 kun tornistro (= dorsosako) sur iu monto

13 kun malfermita libro antaŭ siaj okuloj
14 en urbo, regiono, aŭ lando
15 neniam kun cigaredoj, ĉiam sen cigaredoj
16 enterigita en tombejo malantaŭ la preĝejo

17 persono kiu tradukis libron el la angla en la francan
18 tiu kiu biciklas
19 en operejo antaŭ multe da aŭskultantoj
20 tiuj kiuj venkis

## Prinotu:

kantanto, kantisto; biciklanto, biciklisto; naĝanto, naĝisto
tradukinto, tradukisto; murdinto, murdisto; grimpanto, grimpisto
into, intino, anto, antino, onto, ontino, isto, istino, ulo, ulino, ano ktp

# Vi praktikos:

## participojn

Uzu: *-inte, -ante, -onte,*
*-ita(j),*
*-into, -anto, -onto, -ito, -ato, -oto*

1 Kio estas persono kiu fumas?
2 Ĉu Pako fermis la pordon?
3 Donu al mi la nomon de persono kiu ĉeestis ion.
4 Ĉu la profesoro foriris post kiam li finis la lecionon?

5 Ĉu vi skribis la poŝtkartojn kiujn vi deziris sendi al viaj parencoj?
6 Kiel nomiĝas persono kiun la policano arestis?
7 Ĉu la profesoro klarigis la gramatikon dum li staris?
8 Ĉu vi pakos viajn valizojn morgaŭ por via vojaĝo al Nairobi en Kenjo?

9 En la naĝejo estis tiuj personoj.
10 Ĉu dum li sidis ĉe la bordo de la lago, Sinjoro Rodrigo fiŝkaptis?
11 Ĉu post kiam li kaptis du fiŝojn, Sinjoro Rodrigo hejmeniris?
12 Ĉu Sinjorino Rodrigo purigos la fiŝojn ĉi vespere?

13 Ĉu antaŭ ol li dormis, Pablo pretigis sian liton, kaj malŝaltis la lampon?
14 Ĉu dum li dormis Pablo sonĝis pri strangaĵoj kaj stranguloj?
15 Ĉu vi pensas, ke Pablo forgesis sian sonĝon post kiam li vekiĝis?
16 Ĉu vi forĵetis la malnovajn ĵurnalojn en la rubujon?

17 Tiun personon iu malbonulo murdis!
18 Atentu! Tiujn muŝojn (kvazaŭ personoj) Sinjoro Nopo mortigos per muŝbatilo!
19 Ĉu en nia klasejo oni fiksis afiŝojn ĉe la muro?
20 Ĉu vi jam algluis la poŝtmarkojn sur la koverton?

21 Ĉu dum vi pensas multege, vi faras ĉi tiun ekzercon?
22 Ĉu post kiam vi finos la ekzercon pri participoj, vi estos kontentega?
23 Ĉu antaŭ ol iri hejmen hodiaŭ, vi estos lacegaj pro tro da pensado pri participoj?
24 Ĉu vi jam enkapigis kaj encerbigis la ĉefajn principojn pri participoj?!

## Vi lernos, kaj praktikos

### Repasado

1 Ĉu estas ĝirafo inter vi kaj mi?
2 Ĉu moskitoj kaj kuloj estas grandegaj?
3 Ĉu vi eklernis Esperanton antaŭ unu semajno?
4 Ĉu vi estas profesoro pri matematiko?

5 Kie la suno estas?
6 Kiam vi foriros de nia kurso hodiaŭ?
7 Kial oni vidas, kaj kial oni flaras, kaj kial oni gustumas?
8 Kies vico estas nun?

9 Ĉu la plejparto de laboristoj ferias kutime en printempo?
10 Kio estas multekosta?
11 Ĉu personoj sunbanas sin kiam pluvas?
12 Kien vi iros post la fino de nia kurso hodiaŭ?

13 Kiajn ŝuojn vi havas hejme?
14 Ĉu tio estas ilia?
15 Kian ĉemizon vi havas hejme?
16 Ĉu ni gustumas per oreloj?

17 Kiom da personoj loĝas en Hindio kaj Ĉinio?
18 Ĉu nia kurso daŭros ĝis la noktomezo?
19 Kiel oni viŝas teleron?
20 Ĉu vi surhavas la ŝuojn de nia profesoro?

21 Kiel flugas abelo?
22 Ĉu vi venis ĉi tien por lerni la anglan?
23 Kie estas via loĝejo?
24 Ĉu Esperanto estas lerninda?

## Vi praktikos

### participojn

Anstataŭigu la participojn!

1 Ĉu praktikante la gramatikon, vi komprenas E-on pli kaj pli bone?
2 Ĉu fininte nian lecionon lastan fojon, vi iris hejmen?
3 Kio estas piediranto, kaj kio estas kuranto?
4 Ĉu la pordo de nia klasejo estas fermita, kaj la fenestroj fermitaj?

5 Ĉu enlitiĝonte vi pretigas la liton kaj malŝaltas la lumon?
6 Kio estas dunganto kaj dungitoj?
7 Ĉu ĉio pri la participoj estas enkapigita kaj encerbigita?
8 Kio estas ĉeestantoj kaj partoprenantoj?

9 Ĉu trinkinte grandan glason da freŝa akvo, vi sentas vin pli bone?
10 Ĉu kurante rapide vi enspiras kaj elspiras pli rapide kaj profunde?
11 Ĉu la lampoj de la loko kie ni nun estas estas ŝaltitaj aŭ malŝaltitaj?
12 Kio estas starantoj, sidantoj, kaj kuŝantoj?

13 Kio estas arestitoj kaj kondamnitoj, kaj malliberigitoj?
14 Ĉu fininte la futbalmatĉon, la futbalistoj duŝis sin?
15 Ĉu ludante, ili kutime ŝvitas multege?
16 Ĉu ludonte, ili preparas sin por la matĉo?

17 Ĉu la hispana libro "Bodas de Sangre" estis tradukita de Miguel Fernandez?
18 Ĉu la fridujo kiu estas en la kuirejo estas difektita?
19 Kio estas venkintoj kaj venkitoj en batalo?
20 Ĉu leginte la libron, aŭ ĉu legonte la libron li konis la enhavon?

21 Kio estas lernantoj, komencantoj, kaj parolantoj de Esperanto?
22 Ĉu praktikinte la participojn dum longa tempo, la gelernantoj estis lacaj?
23 Kion faras Pablo dormonte? Kion li faras dormante? Kion li faras dorminte.
24 Kion vi faras matenmanĝonte, matenmanĝante, kaj matenmanĝinte?

## Vi praktikos

**Respondo => Demando**

1 Sur la tablo
2 Sub la tablo
3 Super la tablo
4 Verda

5 Flavaj
6 Estas tri el ili
7 Paŭlo
8 Paŭlo kaj Ramono

9 Jes, tio estas telero.
10 Mi fartas tre bone.
11 Kvin frankojn
12 De lundo ĝis vendredo

13 Tio.
14 Tie
15 Nigraj kaj malgrandaj.
16 Legas.

17 Blankan ĉemizon.
18 Tiom.
19 Brunajn ŝuojn.
20 Kun Mupi.

21 Tio estas libro.
22 Pensas.
23 Ĉar li havas malbonajn okulojn.
24 Per skribilo.

25 Pri matematiko.
26 Muŝbatilo.
27 Ŝia.
28 Je la naŭa.

29 Mia.
30 Kun Mupi.
31 Li nomiĝas Paŭlo.
32 Tiuj floroj.

33 Sinjoro Nopo.
34 Ĉar ŝi estas belega.
35 Kvin personoj.
36 Tiam.

37 Ne, estas nenio tie.
38 Inter Hispanio kaj Germanio.
39 Per flugiloj.
40 Apud siaj geamikoj.

41 Por sensoifigi sin.
42 Mi vojaĝus ĉirkaŭ la mondo!
43 Ruĝa.
44 Trifoje ĉiutage.

45 En la ruĝa botelo.
46 Someron li faris tion.
47 Poste ŝi leviĝis.
48 Viaj.

49 Ne, li ne fartas tre bone.
50 Norden.
51 De Parizo.
52 Pli ol kvin.

53 Neniu.
54 Granda.
55 Grandaj.
56 Libron.

57 Librojn.
58 Kun vi.
59 Tiaj.
60 Por ke la gelernantoj lernu pli rapide kaj bone.
61 Prave!

Vi lernos:

Verboj de daŭro sen rezulto
~~ita(j)~~ => ata(j)

1 Maria estas tre amata de Paŭlo.
2 Nia kurso estis gvidata de Dennis lastmonate.
3 Nia kurso estas gvidata de Dennis nun.
4 Nia kurso estos gvidata de Dennis venontmonate.

5 Lia nova ĵus eldonita libro estas laŭdata de multaj sed ne de ĉiuj.
6 La bona grizhara reĝo estis admirata de ĉiuj regnanoj.
7 Kiom da libroj estos bezonataj por la kurso kiu komenciĝos en la venonta semajno?
8 Ĉu tiu fakto estas konata de ĉiuj?

9 Estas konate, ke la plejparto de Svedoj lernas la anglan lingvon bone.
10 Vi serĉas libron? Kiel titoliĝas la libro serĉata de vi?
11 En Francio, la kasteloj de la Valo de la Rivero Loire estas vizitataj de multe da turistoj ĉiujare.
12 Ĉu viaj lingvaj eraroj estas aŭ ne estas tolerataj de via instruisto?

13 La mistera persono estis sekvata de egale mistera detektivo.
14 La prakristanoj estis persekutataj de la Romiano Nerono.
15 Mono kiu estas havata estas pli utila ol mono kiu estas havita!
16 Ĉokolado estas ŝatata de ĉiuj infanoj.

17 La uzo de la akuzativo estas postulata en nia kurso ĉiam!
18 Universala lingvo estas volata de multaj.
19 Kiom da mono estas ŝuldata al nia firmao?
20 En la lasta jaro tiu kastelo estis vidata de pli ol dek mil turistoj.

21 La prakristanoj persekutataj de la Neronuloj sin kaŝis en katakomboj.
22 Sur ĉiuj stratoj estis sentata la odoro de ansera rostaĵo. (Z)(PIV)
23 La kuniklo estis sekvata de la hundoj de la ĉasistoj.
24 La nova leĝo, kvankam ne respektata de ĉiuj, estas bona plibonaĵo.

## Vi lernos, kaj praktikos

## -ITA, -ATA

1 Ĉu nia instruisto fermis la pordon?
2 Ĉu Paŭlo amas Marian?
3 Ĉu oni ŝaltis la lampon de la klasĉambro?
4 Ĉu la Esperantistoj laŭdis la kreinton de la Internacia Lingvo?

5 Ĉu Betoveno komponis naŭ simfoniojn?
6 Ĉu Mikel-Anĝelo skulptis multajn belajn skulptaĵojn?
7 Ĉu la ĵurnalo mencios Esperanton en artikolo morgaŭ?
8 Ĉu la gelernantoj bezonas bonan vortaron kiel la Plenan Ilustritan Vortaron (PIV) por bonege lerni Esperanton?

9 Ĉu preskaŭ ĉiuj infanoj ŝatas ĉokoladon kaj aliajn dolĉaĵojn?
10 Ĉu vi scias, kiam Doktoro Zamenhof publikigis la *Fundamenton de E-o*?
11 Estis kvar mortintaj muŝoj sur la planko? Kiu mortigis ilin?!
12 Laŭ vi, ĉu la plimulto de la homaro konas la fakton, ke E-o bone vivas?

13 Parolu al mi pri mono kiun oni havas, kaj pri mono kiun oni havis?
14 Kiom da demandoj mi starigis al vi, kaj kiom vi al mi?
15 Ĉu Usonano kiu nuntempe loĝas en Eŭropo verkis la BEKkurson?
16 Ĉu la BEKkurso ĉiam postulas la bonan uzadon de la akuzativo?

17 Ĉu la laboristoj volas la forigon de senlaboreco?
18 Ĉu vi esperas, ke la urbodomo pligrandigos la parkojn de via urbo en la venonteco?
19 Kion eligis la dentisto el la buŝo de la paciento?
20 Kiam oni mendis la librojn de la libroservo de Esperanto?

21 Ĉu Sinjoro Rodrigo konstruigos novan domon post du aŭ tri jaroj?
22 Ĉu la gepatroj multe amas la gefilojn?
23 Kiam vi faksos tiun leteron por San Francisko?
24 Ĉu vi jam afrankis kaj poŝtis la leterojn kiujn mi diktis al vi?

Vi lernos:

## Repasado, Opinioj

1 Ĉu estas vere, ke nun pluvas?
2 Ĉu estas fakto, ke tro da alkoholaĵoj ne estas bona por la sano?
3 Ĉu vi konsentas kun la verkisto de la BEKkurso, ke oni devas praktiki multe por lerni Esperanton?
4 Ĉu vi samopinias kun Pablo kiam li diras, ke ĉiuj devas lerni la anglan?

5 Maria diris, ke Japanoj estas tre laboremaj. Ĉu vi samopinias?
6 Ĉu estas vere, ke komputiloj plialtigas senlaborecon?
7 Ĉu estas fakto, ke ju pli oni praktikas E-on, des pli oni flue parolas?
8 Kaj male, ĉu estas fakto, ke ju malpli oni uzas E-on, des malpli oni flue kaj bone parolas?

9 Ĉu estas certe, ke laboristoj kiuj laboras multe ĉiam perlaboras pli da mono ol tiuj kiuj ne estas tiel laboremaj?
10 Ĉu tio estas vera, ke Usono gajnis la mondan futbalmatĉon?
11 Ĉu ŝajnas al vi, ke kiam iuj diras, ke la angla lingvo solvos la internacian komunikadan problemo, ili troigas?
12 Laŭ vi, kiu estas la plej belaj viro kaj virino en la tuta mondo?

13 La plej bongusta trinkaĵo estas kokakolo. Ĉu mi pravas aŭ malpravas?
14 Ĉu ŝajnas al vi, ke estas varme ĉi tie? Aŭ kontraŭe?
15 Miaopinie Esperanto estas tre interesa lingvo. Kaj viaopinie?
16 La BEKkurso estas pensiga kaj utila. Ĉu vi opinias tute same kiel mi?

17 La plej bela sezono estas vintro. Ĉu vi konsentas kun mi pri tio, aŭ ĉu vi havas alian opinion?
18 Oni diras, ke "kiom da homoj, tiom da gustoj." Ĉu vi samopinias?
19 Ĉu estas fakto, ke la suno pli brilas en Nordafriko ol en Nordeŭropo?
20 Ĉu mi pravus se mi dirus, ke la tero ne estas ronda sed plata?!

21 Serpentaĵo estas pli bongusta ol kokinaĵo, ĉu ne?
22 Fromaĝo estas pli bonodora ol parfumo, ĉu?
23 Ĉu vi opinias, ke oro estas pli multekosta ol arĝento aŭ male?
24 Ĉu multfoje estas vere, ke "Kia patro, tia filo"?

Vi lernos, kaj praktikos

## Participoj adjektivaj

## Pristudu la sekvantan tabelon:

| | | |
|---|---|---|
| venkinta teamo | = | teamo kiu venkis |
| venkanta teamo | = | teamo kiu venkas |
| venkonta teamo | = | teamo kiu venkos |
| venkita teamo | = | teamo kiun oni venkis |
| venkata teamo | = | teamo kiun oni venkas |
| venkota teamo | = | teamo kiun oni venkos |

## Ekzemploj:

* La vino kiun Arturo trinkis estas bongusta.
* La vino trinkita de Arturo estas bongusta.

* La ĉapeloj kiujn ili portas estas blankaj.
* La ĉapeloj portataj de ili estas blankaj.

## Ekzerco

1 La libro kiun Julio legas estas granda.

⇒

2 La peziloj kiujn Pablo levas estas ege pezaj.

⇒

3 La vino kiun Arturo trinkis estas tre bongusta.

⇒

4 La valizoj kiujn Maria pakis estas grandaj.

⇒

Vi praktikos

## Participoj adjektivaj

## Ekzemplo:

Kio estas <u>persono staranta ĉe semaforo</u>?
Persono staranta ĉe semaforo estas <u>persono kiu staras ĉe semaforo</u>.

1 persono staranta ĉe semaforo (= trafiklumo)
2 personoj starantaj en halo de hotelo
3 geknaboj sidantaj sur la planko
4 policano helpanta turiston

5 turisto helpata de policano
6 fenestro fermita de vento
7 personoj vojaĝontaj tuj
8 personoj vojaĝintaj por skii en montaro

9 personoj vojaĝantaj tra Francio per la trajno TGV
10 pantalono ŝirita de dorno de rozujo
11 pantalonoj ŝiritaj de akraj objektoj
12 leteroj kaj poŝtkartoj skribotaj

13 sekretariino tajpanta leteron
14 vekiĝintaj gepatroj
15 vekitaj gefiloj
16 leviĝontaj knabinoj

17 rubo forigota el la loĝejo
18 cigaredo ekbruligita de alumeto
19 virino transiranta la straton
20 piedirantoj atendantaj ĉe la rando de trotuaro


21 gelernantoj ĉeestontaj la novan kurson en aŭtuno
22 lingvo parolata en Japanio
23 lingvoj parolataj en Svisio
24 studentoj studantaj la anglan lingvon kaj Esperanton

**5**

1



2



3



... fishing line swimmer



Paĝo 25

## Vi praktikos:

**Demandaro pri bildo**

1 Ĉu homo fiŝkaptas en la unua bildo maldekstre?
2 Ĉu li estas juna, mezaĝa, aŭ maljuna?
3 Kion li havas en la manoj? Reton aŭ stangon?
4 Ĉu li fiŝkaptas en oceano, maro, lago, rivero, aŭ flako?

5 Ĉu infanoj naĝas kaj ludas en la rivero?
6 Kiom da infanoj ludas en la rivero?
7 Laŭ vi, kiu sezono estas? Aŭtuno, vintro, printempo, aŭ somero?
8 Kio estas super la rivero?

9 Ĉu la ponto estas farita el ligno, el ŝtalo, aŭ el ŝtono?
10 Ĉu la fiŝkaptanto staras, kuŝas aŭ sidas?
11 Ĉu la korbo maldekstre de li estas plena aŭ malplena?
12 Ĉu li, ĝis nun, havas bonan ŝancon aŭ malbonan ŝancon?

13 En la dua bildo, ĉu vi vidas knabon?
14 Kiom da jaroj vi opinias, ke tiu infano havas?
15 Ĉu li estas super, sur, aŭ sub la akvo?
16 Kial la knabo ne povas spiri?

17 Kio sur la fundo de la rivero estas? Pantoflo, ŝuo, aŭ boto?
18 Kion tiu junulo en la dekstra mano havas?
19 Kiun aĵon li tenas en la alia mano? Ŝlosilon aŭ hokon?
20 Kial la knabo alproksimiĝis al la boto?

21 Kial li ne povas esti vidata de la fiŝkaptisto?
22 Kio rigardas la knabon meti la hokon sur la boton?
23 Ekrigardu la lastan desegnaĵon, ĉu la knabo estas ankoraŭ sub la akvo?
24 Ĉu vi ankoraŭ vidas la junulon?

25 Kie li estas?
26 Kion li faras? Ĉu li alproksimiĝas au malproksimiĝas?
27 Kiom da fiŝoj videblas nun en la korbo?
28 Kia estas la korbo? Preskaŭ plena aŭ preskaŭ malplena?

29 Priskribu la reagon de la maljunulo. Ĉu li surpriziĝas?
30 Kial li estas surprizita?
31 Kion faras la geknabloj malantaŭ li?
32 Kion rakontos la fiŝkaptanto al sia edzino kiam li hejmeniros?

---

33 Rerigardu la unuan bildon. Kia estas tiu kiu sidas sur la riverbordo?
33 Ĉu li subakvigis la hokon kun vermo?
34 Ĉu li eligos la hokon kaj vermon poste?
35 Ĉu li esperas, ke li plenigos sian korbon je fiŝoj kaj fiŝetoj?

36 Ĉu estas aliaj fiŝkaptantoj apud aŭ proksime de li?
37 Ĉu vi pensas, ke li priatentas sian fiŝadon aŭ la naĝantan knabon kiu alprosimiĝas?
38 Kiom da naĝantaj geknaboj vi vidas?
39 Ĉu vi pensas, ke la geknaboj starantaj apud li poste naĝos?

40 Ĉu granda velŝipo povas iri en tiu rivero, aŭ ĉu oni devus plilarĝigi la riveron unue?
41 Kion vi kredas: ĉu estas mateno kaj la temperaturo plialtiĝas, aŭ ĉu estas vespero kaj ĝi malplialtiĝas?
42 Ĉu alveninte al la bordo de la rivero la maljunulo sidiĝis kaj ekfiŝis?

43 Nun ni iru al la meza bildo. Kiu subakviĝis?
44 Kion li faris subakviĝonte? Ĉu li malfermis aŭ fermis sian buŝon?
45 Ĉu la hoko kroĉota de la knabo havas vermon?
46 Ĉu vi vidas la knabon elbuŝigi bobelojn?

47 Ĉu sub la akvo vidiĝas kaj aŭdiĝas fiŝoj?
48 Ĉu sidante sur la bordo de la rivero, la grizbarbulo vidas la knabon?
49 Kien iros la knabo kroĉinte la hokon en la boton?
50 Kion tenas la knabo kroĉanta la hokon?

51 Nun ni priparolu la trian bildon. Ĉu estas fiŝo kuŝanta en la korbo?
52 Kiamaniere tiu fiŝeto enkorbiĝis?
53 Kiu eligos la fiŝon el la korbo, laŭ vi, poste?
54 Kion faras la starantoj apud la grizbarbulo?

55 Ĉu la okazaĵoj de la tago kontentigis la maljunulon?
56 Fininte la fiŝkaptadon, kion li faros?
57 Ironte hejmen, kion li devas fari?
58 Irante hejmen, kion li faros?
59 Irinte hejmen, kion li faros?

Vi praktikos:

## Participoj adjektivaj

1 birdo enkaĝigita en skatolo
2 kokino senplumigita por kuiri
3 krimulo malliberigita pro krimoj
4 leteroj skribitaj per nigra inko

5 koncepto klarigita de la profesoro
6 personoj atendantaj ĉe bushaltejo
7 libroj starigitaj sur breto
8 kontrakto plenumita de firmao

9 domaj tegmentoj tegolitaj de laboristo
10 laboristoj konstruantaj ponto por transiri la riveron
11 gravuritaj desegnoj
12 Unuiĝintaj Nacioj

13 malfermiĝanta rozo
14 malfermiĝinta rozo
15 manoj ŝirmantaj la okulojn
16 ilo uzata por segi

17 teamoj venkotaj
18 viando rostita aŭ fritita por manĝi
19 vojaĝantoj vojaĝontaj en la venonta buso
20 la rapide disvolviĝanta komputila industrio

21 lingvoj parolataj en Svisio
22 bebo naskota post iom da tagoj
23 bebo naskiĝonta en la venonta monato
24 bona ideo ankoraŭ ne elegante vortigita

25 la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Usono
26 sekiĝinta floro
27 la iam unuigita regno de Granda Britio kaj Irlando (PIV)
28 ariĝontaj birdoj

## Vi lernos, kaj praktikos

## -iĝ, -ig, -igita, -iĝinte

La registaro ŝanĝis la prezon de benzino. Nun ĝi estas pli alta ol antaŭe.

⇛ La prezo de benzino altiĝis.
⇛ La registaro altigis la prezon de benzino.
⇛ La prezo estis altigita de la registaro.
⇛ Altiĝinte, la prezo de benzino estas nun altega.

1 Li trinkis tro da viskio kaj nun estas ebria.

2 Se vi daŭre manĝas ĉokoladon, sukeron, kaj dolĉaĵojn, vi estos dika.

3 La lernantoj estis tute lacaj pro la longaj hejmtaskoj.

4 Liaj revoj iĝis realaj pro la granda heredaĵo de la geonkloj.

5 La kuiristino metis la torton en la fornon, por ke ĝi estu varma.

6 Ju pli bona estas la instruado de Esperanto, des pli vasta estos ties uzo.

7 Post la nova leĝo kontraŭ bruo, la urbo estas multe pli trankvila.

Vi faros:

Eligu, forigu, elradikigu la erarojn!

1 Bonan matenon! Kiel vi faras?
2 Kiel vi nomas?
3 Mi nomo estas Marta Medrano.
4 Kio estas tioj sur la tablo? Ĵurnaloj aŭ revuoj?

5 Kiuj tiuj estas dekstre la tablo? Bob kaj Tom?
6 Ĉu vi plaĉas skii en la montaro en vintro?
7 Mi surhavas brunaj ŝuoj.
8 Hieraŭ mi butikumas en la centro de la urbo.

9 Rigardu la granda bovaro! Estas almenaŭ mil bovoj!
10 Bonvolu donu al mi varman tason da teo.
11 Kioma horo estas? Estas je la kvara kaj tri kvaronoj.
12 Kion libron vi volas? La ruĝan aŭ la bluan?

13 Ŝi eklernis Esperanton antaŭ de nur tri semajnoj.
14 Kie vi iros ĉi jare por ferii? Ĉu al Italio?
15 Kiaj ŝuoj vi aĉetis hieraŭ kiam vi iris al tiu vendejo?
16 Ĉu vi vidas la blanka kaj nigra katojn sub la tablo?

17 Jes, al mi plaĉas trinki kafon kun lakton, sed sen sukeron.
18 Estas du dek tri personoj kiuj vojaĝos kun ni al Moskvo.
19 La sciencisto pensas per malsimpla, komplika problemo.
20 -Jen via kafo. -Nedankinde. -Dankon.

21 Mi ne scias, kion estas inter la forko kaj kulero.
22 Kiom muŝoj flugas ĉirkaŭ la lampo?
23 Alberto Medrano estas laca, ĉar li ripozis la tutan tagon.
24 -Kia estas mia korktirilo? -Ĝi estas apud la botelo da vino.

25 Kiu estas tiuj kiuj parolis kun vi en la kafejo hieraŭ?
26 Morgaŭ ni kaj niaj geamikoj iris al la parko.
27 Kiaj estas la valizoj kiuj Ana kaj Maria pakis?
28 -Ĉu Tokio estas granda aŭ malgranda? -Jes, ĝi estas granda.

29 -Jen via trinkaĵo. -Dankon. -Dankinde.
30 Kio tio estas tie? Tioj estas tasoj kaj teleroj.
31 -Kies estas tio ĉi? -Tio estas sur la tablo.
32 Kie iros la valizoj kiujn Maria pakis por sia vojaĝo?

33 Ĉu vi ŝatas la persono kies hararo estas ruĝa?
34 Novjorko estas multe pli granda ke Vaŝingtono.
35 -Kie estas liaj skribiloj? -Tio.
36 Ĉu ies vizaĝo trovigas tie en la apuda ĉambro?

37 Bonaj futbalistoj ĉiam celas helpi iliajn teamojn.
38 De kio estas la tabloj ĉi tie? Ligno? Ŝtalo?
39 En kion metis Johano la sukero?
40 La kelnero de la restoracio ekprenis korktirilon por malŝtopi botelon da lakto.

41 Ili estas tiel alta kiel la frato.
42 Everesto estas la pli alta monto en la tuta mondo.
43 Ĉu vi pligrandigos la parkojn se vi estus la urbestro de nia urbo?
44 Ĉu ŝatus al vi iĝi riĉa?

45 Ili havas kurson de Esperanto ĉiumerkreden.
46 Ĉu vi deziras kafon kun lakton?
47 Kiu strato estas kia troviĝas la plej proksima malsanulejo?
48 La profesoro instruis por ke la gestudentoj lerni.

49 Ni ne havos lecionon la venonta merkredo, ĉar ĝi estas festtago.
50 Mi vekiĝis je la sepa kaj kvarono. Poste tio mi levis min.
51 En nia kurso de Esperanto la kursgvidanto klarigas ĉio esperante.
52 Kiuj landoj estas tra kiu fluas la rivero Danubo?

53 Kia estas via naskiĝurbo kaj kiom personoj loĝas tie nun?
54 Kion vi pensas pri Esperantistoj al kiuj plaĉas krokodili la tuta tago?
55 Estas la kvina kaj tri kvarono.
56 Ĉu al vi plaĉas trinki sukerita teo kun citrono?

57 Pomoj estas bonaj por la sano, ĉar ni manĝas multe da ili.
58 Hodiaŭ estas lundo. Postmorgaŭ estas ĵaudo.
59 Ĉu nia kurso komencis antaŭ pli ol unu monato?
60 Kie troviĝas malmultekostan hotelon?

61 -Kiuj ĉeestis la prelegon antaŭhieraŭ? -Mi ne scias kiujn ĉeestis ĝin.
62 Ĉu vi pensas, ke estis varme en la venonta semajno?
63 Ĉu vi povus pruntedonus al mi mil dolarojn?
64 Kio ni devas fari por lerni Esperanton bone kaj rapide?

65 -Kiujn pomojn vi deziras? La ruĝaj aŭ la verdaj?
66 -Kies pulovero estas sur la tablo? -Mi!
67 -Kiuj piroj kaj prunoj estas freŝaj? -Tio.
68 Celia legis interesan libron pro la historio de Hispanio.

69 Ĉu tio estas ŝia? Ne, ĝi ne estus ties.
70 Kiu estas tiu kun kiuj Maria parolas?
71 Li perfektiĝas sian Esperanton. Li parolas pli kaj pli bone.
72 Antaŭ ol vojaĝis al Usono, Sinjoro Rodrigo mendis bileton de aviadilo.

73 Li trinkis ege malmulte. Li trinkegis.
74 Iuj klientoj enbutikigis por aĉeti diversajn aĵojn.
75 Kiam vi iras rigardi filmon en kinejo, ĉu vi preferis iri sole, kun nur unu alia persono, aŭ kun aro da personoj?
76 Kompreneble tiu persono plaĉas al mi multe. Li estas granda aĉulo!

77 Kiajn ŝuojn mi surhavas? Nigraj, kiel ĉiam!
78 De kien vi venis, kaj kien vi iros poste?
79 Guto da akvo estas, alinome, akvaro.
80 La birdaro ekflugis kiam la birdoj ekaŭdis la laŭtajn pafojn de la ĉasistoj. Ili tuj disigis.

81 -Kiam vi naskis? -Antaŭ 25 jaroj.
82 -Kio estas via antaŭnomo? -Mi nomas min Sinjoro Rodrigo.
83 Mi manĝas en restoracio de tempo en tempo. Eble kvinfoje ĉiujare.
84 Noktiĝis, do Pablo ŝaltis la lampon por ke li vidu pli bone.

85 Ĉu oni riparis viajn bicikon kaj motorciklon? Ĉu ili estas riparita?
86 Vidiĝas tukanojn kaj aliaj diverskoloraj birdoj en Sudameriko.
87 Mi havas hejme du hundojn. Anstataŭ tio mi havas unu katon. Do entute mi havas tri dombestetojn

88 Malgraŭ la pluvego, mi restis hejme la tutan matenon.
89 Leciono nia komencis je la oka kaj duono akurate.
90 Kies kapo estas granda? Tiu de la sciencisto aŭ tio de Paŭlo?
91 Estas treege varma, ĉu ne?
92 Ĉu vi voli paroli Esperanton tre flue kaj senhezite?

93 Iru norde al Stokholmo.

94 Kiujn bananojn vi volas aĉeti? Ĉi tion?

95 Estas bedaŭrinda, ke estas tiom da polucio en niaj riveroj!

96 Ĉu urĝas, ke la registaroj forigas la problemon de senlaboreco en la mondo?

97 Hieraŭ en loka ĵurnalo aperigis artikolon pri Esperanto kaj la Kastelo de Grésillon.

98 Li starigis la libron sur la breton, do nun la libro starigas sur la breto.

99 La aviadilo flugis de Londono ĝis Novjorko. Ĝi flugis trans la oceano.

100 -Kie la salo estas? -Ĝi estas en la salumo, kompreneble!

101 La arbo hakataj de la hakisto estas abio.

102 Donu al mi iom da akvon, mi petas.

103 Per tiu katastrofo okazigis la morton de iu pasaĝero.

104 Ĉu vi vidis la pretigitaj valizojn? Mi ne povas trovi ilin.

105 Vi pravas kiam vi diras, ke du foje tri egalas kvin.

106 Ĉu vi preferas neĝon ke pluvon, aŭ male?

107 -Ĉu vi estas laborema aŭ mallaborema? -Jes, mi estas mallaborema.

108 Vekiĝonte, Pablo iris al la necesejo.

109 -Ĉu ŝi surmetis varmajn vestaĵon, ĉar neĝis kaj ventis? -Jes, per tio.

110 La birdoj, kiuj flugas super la granda domo, mi bone vidas.

111 Post la koncerto, la violonistoj agordis siajn instrumentojn por ludi.

112 Se mi surhavas flavan aŭ brunan ĉemizon, kuru norde!

113 La tero rondiras al la suno.

114 Venkinta teamo de futbalo estas teamo kiun oni venkis.

115 La kelnero metis siajn trinkaĵojn sur la tablon de la teraso.

116 Mi estas manĝema kaj mi manĝas ĉio kion mi povas!